

ESPERANTO

TRIUMFONTA

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advok., Edinburĝ
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 176
27. 1. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. K8ln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,20 sv. fr. por landoj, kies valuto
sufiĉas maksimume 90%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,06 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anonprezo

po kvadrata-centimetra egalvaloro de
0,20 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝ, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Esperanto en la radio-sfero.

La radio-telefonio kaj ni.

La moderna tekniko progresadas senhalte. Ĉiutage ĝi surprizas nin per novaj eltrovitaj. Tio, kio antaŭ deko da jaroj ankoraŭ ŝajnis fabelo, hodiaŭ estas realeco. Unu progreso superas la alian. Sufiĉas ekzemple nur atentigi pri la evoluo de la aer-veturado.

En plej nova tempo nova sfero ekkaptis la publikon. Ne longtempe antaŭ la milito ni mirigis pri la ebleco senfadene telegrafi je mezlonga distanco.

Dum la milito oni jam ne plu konis limojn kaj hodiaŭ oni jam telefonas senfadene. La senfadena telegrafo jam ludas gravegan rolon en la tiumonda trafiko. La telefonio senfadene evidente konkeros ĝian rolon. Ĉiuj okazantaĵoj pravas tion. En Usono, la lando de la senlimaj eblecoj, granda movado de amatoroj al tiu ĉi scienco interligas milojn da ricevaratoj kun la senlima sfero. En multaj aliaj landoj oni sekvas la ekzemplon.

Oni jam povas konstati la ekintereson por praktika apliko de la telefonio senfadene. Kiom da tempo daŭros — kaj la apliko de la senfadena telefonio estos memkomprenebla por la ĉiutaga vivo?

La praktiko tamen vidigas al ni, ke ekzistas unu ĉefa malhelpo: la diverslingveco. Ni esperantistoj ja konas ĝin kaj propagandante nian lingvon celas forigi la malhelpon. Ĉu estas malfacile ekkoni la avantaĝojn, kiujn ĝuigas nia helplingvo? Evidente ne. Kaj tamen la granda publiko ankoraŭ indiferece flankenlasas Esperanton. Ne estas dubo, ke la pluevolvo de la radio-telefonio pli kaj pli vidigos la multilion de la diverslingveco. Sekve de tio ekestigas mil ebloj por antaŭenpuŝi nian aferon. Ĉu ni bezonas detale klarigi ilin? Ĉu mi citu la rezonojn pri la nepra neceso de Esperanto en la universala interkomunikigo? Certe ne. Praktikaj samideanoj jam trovis metodojn pri apliko de Esperanto kaj ili estas simplaj. De diversaj flankoj jam venis sugestoj kaj proponoj pri aranĝo de speciala fak-organizado, okupanta sin pri tiu ĉi sfero. Espereble tre baldaŭ oni konstatos jam la agadon de la fondota organizacio.

La hodiaŭa numero de ET estas grandparte dediĉita al la progresoj de la radio-telefonio. La unua artikolo priskribas la instalon de radiotelefona stacio en Warszawa; la dua vidigas la praktikan valoron de rusa stacio en Novaja Semla. Kiujn sukcesojn la radiotelefona transigo de komunikadoj jam atingis kaj kiujn eventualajn surprizojn ĝi ankoraŭ povos fari al ni, ilustras franca specialinformo. Kiamaniere Esperanto povas esti aplikata kaj kiel jam faris tion senlacaj rusaj samideanoj, videbligas detala raportaro de Sovetlanda Esperanto Unuiĝo (SEU). Por intereso pri la dondas ankoraŭ resuman informon pri la koncerna organizacio, literaturo kaj gazetaro. Pri la leĝaj kondiĉoj koncerne tiun ĉi sferon en Germanujo ni jam publikigis artikolon. Resumon pri ili en aliaj landoj ni esperas povi baldaŭ enpresii.

Kiom longtempe ankoraŭ, ĝis ni esperantistoj reciproke interrilatos ĉefe radiotelefono? Ĉu iluzio? Kiu scias tion?

Robert Kreuz.

La transatlantika radiostacio en Warszawa.

La 17-an de novembro estas transdonita al la postadministracio la novinstalita transatlantika radiostacio en Warszawa.

Ĝi konsistas el dek ferkonstruitaj turoj, ĉiu po 126,5 metroj alta, starantaj en vico dukilometra. La stacio posedas propran elektron, fortan je 1000 C. P. kaj per tio ĝi estas sendependa de la urba elekto de Warszawa. Ĝi ankoraŭ posedas propran instaladon por akvo.

La instalaĵoj sendaj kiel ankaŭ la ricevaj estas koncentritaj en speciala sekcio de la ĉef-telegrafoficejo Warszawa.

La alternatoro posedas skalon permesantan produkti elektrajn ondojn longajn 18—21 milojn da metroj. Per ĝusta aranĝo de la ilaro oni povas atingi longecon eĉ de 15000 m. La alternatoroj estas tiel koncentritaj, ke sufiĉas akva malvarmigo anstataŭ olea. Ĉiuj ĝis nun uzataj sistemoj nepre postulas olean malvarmigon. La akva malvarmigo funkcias aŭtomate. Krom tio posedas la stacio apartan aranĝon por senigi la antenojn de glacio kaj fulgo. Tiu ĉi aranĝo certigas al la stacio bonan funkciadon ankaŭ dum la vintraj monatoj. Facile oni komprenas la gravecon de tiu ĉi aranĝo, se oni konsideras la egajn malfacilaĵojn kiuj je aliaj stacioj estas kaŝzitaj per ofiaj disŝiroj de la antenoj dumvintre. Ĝis nun la Warszawa stacio sole estas provizita je tiu ĉi aranĝo.

La antenoj konsistas el du apartaj sekcioj reciproke sendependaj, kiuj samtempe povas esti uzataj aŭ kune, aŭ aparte. Pro tiu ĉi aranĝo kaj ankaŭ pro tio, ke la stacio posedas du rapidŝanĝeblajn alternatorojn, oni povas samtempe sendi du telegramojn diversdirekte. La stacio krome estas tiel aranĝita, ke ĝi povas samtempe ricevi tri telegramojn. Sekve povas la telegrafio samtempe prilabori eĉ kvin telegramojn. Tio signifas, ke ĝi povas komunikiĝi kun kvin aliaj stacioj samtempe. Konstatante plue, ke dank' al specialaj instalaĵoj oni telegrafas per la memskribanta ricevilo same kiel per maŝina sendilo kun rapideco de 400 literoj pominute, oni facile povas konvinkiĝi, ke la Warszawa stacio starigis novan tiumondan rekordon por la senfadena telegrafado.

La tereno sur kiu troviĝas la stacio kaj kiu por tiu ĉi celo estas zorgeme elektita ne nur montriĝis rilate la geologiajn kondiĉojn tia, kia ĝi devus esti laŭ espero de geologo, sed ĝi superis neatendite ĉiujn esperojn. Estis antaŭridite, ke la elektra rezisto de la grundo estos nur tiu de 0,5 omoj dank' al nova sistemo de alterigo. Post la finkonstruo montriĝis tamen, ke la rezisto estas tiu de 0,1 omoj, sekve ĝi estis kvinfoje malpli forta.

Dank' al tiu ĉi fenomenala cirkonstanco pliigis la forto de la stacio kvinoble kaj la stacio forsendas ondojn kiuj estas multoble pli foraj ol tiuj de aliaj stacioj aplikantaj pli fortan elektran energion, kiu estas plej parte konsumata per la loka elektra rezisto.

Tiamaniere estas la Warszawa stacio nepre la plej forta radiostacio de la mondo povante labori kun forto 25% pli forta ol la plej forta stacio en la mondo. Ĝiaj ondoj povas esti ricevataj ĉiuloke.

Pawel Prabucki, Miłostaw, Polujo.

Radiostacio sur „Novaja Semla“.

En komenco de oktobro estas malfermita radiostacio sur insulo „Novaja Semla“ (nova lando), sur norda bordo de markolo Matoĉkin Sar, apud ĝia eliro en Karskan maron. Ĉe tiu radiostacio estas starigita ankaŭ observatorio, kiu estas la plej norda konstanta arka observejo. Kun la stacio restis, krom la necesaj teknikistoj, 10 reprezentantoj de la diversaj natursciencoj, ekzemple magnetologo, geofizikisto, meteorologo, geologo, biologo ktp., kiuj estas provizitaj per ĉiuj aparatoj kaj instrumentoj necesaj por la plenumataj esploradoj.

La stacio havas grandegan sciencan kaj praktikan signifon.

Pri la graveco de la nordmara vojo kiel senpera interligilo de Siberio kun tiumonda komercio jam neniu dubas. Granda parto de tiu vojo kondukas

tra Karska maro, oriente de Novaja Semla, tre danĝera por la ŝipveturado pro neregula vaganta glaciario. La nova radiostacio kune kun tri jam antaŭe funkciantaj (Ingorski Sar, Vajgaĉ, Mare-Sale) ebligas al la ŝipoj direkti sin laŭ la hidrometeorologiaj kondiĉoj: per radio ili ricevas ĉiujn necesajn sciigojn pri vetero, vento, glaciĉiro ktp. Ĉiuj tri markoloj estas nun esploritaj, kio grave plifaciligas la trafikon en Karska maro.

Krom tio la nova radio-stacio servos kiel bazo por estontaj diversaj ekspedicioj laŭ bordo, kiel ankaŭ en la internon de „Novaja Semla“. Ĝis nun okazis nur mallongtempaj, du-trimontaj esploradoj de la insulo dum vizito de diversaj ŝipoj. La nova stacio estas jam konstanta observejo, el kiu fariĝos baza kolonia punkto, kiu allogos la enlandajn nomadojn.

La politika signifo de la nova stacio konsistas en tio, ke ĝi reale esprimas la apartenon de tiu lando kun ĉiuj ĝiaj riĉaĵoj al Sovjeta Rusujo.

H. Frank, Kazanĵ (Tatara sovjeta respubl.)

La transatlantika radiotelegrafo je mallongaj ondoj.

Oni jam scias ke la amerikaj amatoroj de telegrafado senfadene havis tre rapide permeson por posedi elsendpostenojn, kondiĉe tamen ke ĝi ne superu certan ondlongecon (200 metroj) kaj certan forton.

Multinterese estis koni kia povas esti la traf-povo de ĉi tiuj postenoj tiel malfortaj. Tial en 1921 kaj 1922 estis organizitaj transatlantikaj konkursoj. En 1921, oni ricevis en Eŭropo senditaĵojn de ĉirkaŭ trideko da amerikaj amatoroj, kaj en 1922 s-o Deloy, loĝanto en Nice (Francujo) povis esti aŭdata en Usono.

Nova konkurso transatlantika okazis en decembro 1925. Kaj denove s-o Deloy sukcesis esti aŭdata en Usono.

Post sia unua provo sukcesplena, s-o Deloy decidis ŝanĝi sian postenojn.

Li komence estis uzanta unu platan antenon, poste duplatan kaj fine li elektis prismon kun kvar fadenoj, du elsendplatoj de kvarono da kilovato kaj ondlongeco de 100 metroj. Post facilega komunikigo kun unu amatoro de Marseille kaj poste unu alia de Orléans (Francujo), li surprize kaptis fragmenton de koncerto elsendita sur 100 metroj de Pittsburg (Usono). Dum unu monato, ŝanĝante ĉiutage sian reguligon, li faris eksperimentojn kun amatoro loĝanta en la ĉirkaŭaĵoj de London, kaj kiam ĉio estis preta, li decidis provi la transatlantikajn komunikojn.

Li avertis per kablo la amerikajn amatorojn kun kiuj li jam interrilatis, kaj li sendis tutsimplajn sciigojn la 26-an de novembro, inter la 2-a kaj 5-a horoj matene. Nenia respondo alvenis al s-o Deloy per la telegrafo senfadene, malgraŭ ke li estis atente aŭskultinta, tuj post kiam liaj elsendoj estis finitaj, sed li havis la surprizon matene ricevi kablogramon de Hartford (Connecticut) sciigantan al li la bonalvenon de lia elsendaĵo je la 21 horo de Connecticut la dudek kvinan.

La 28-an, je la unuaj horoj matene en Francujo (la 27 je 22 h. en Usono) la ira kaj revena interrilato estas starigita. S-o Deloy sendis saluton al la amerikaj amatoroj de T. S. F. kaj ricevis returne gratulojn de la amatorposteno de Hartford pro la sukceso de sia provo.

De ĉi tiu dato, s-o Deloy povis ĉiunokte korespondadi tre regule kun la amerikaj postenoj, interalie en Elisabeth (New-Jersey) kaj Kitchener (Ontario) precipe dum la nokto de 12—13 decembro.

S-ro Deloy, la franca manipulanto, sendis kvin alvokojn, al kiuj lia usonaj inĝenieroj respondis per du senditaĵoj.

Ladreg.

Radio-raporto de S. E. U.

Du raportoj kun aldono de
Victor Javorenkov, Moskva.

I.

La 12 aprilo 1923 Narkompoŝtel (Popola Komisararo de Poŝto, Telegrafo, Telefono kaj Radio) k-do Dovgalevski sciigis ĉefan radio-inĝenieron k-don Pepkeviĉ, ke li disponigu por prez. de Sovetlanda Esp. Unuiĝo (SEU) al k-do E. Drezan la radiotelefonon por fari radio-lekcion en rusa lingvo pri neceso de internacia lingvo por proletario kaj en Esp. pri Sovetlanda Esp. Unuiĝo.

La parolado de k-do Drezan estis transdonita de li la 25 aprilo 1923 en potenca radio-stacio je la nomo de Komintern.

La penso pri aranĝo de radio-telefona esp. lekcio-parolado naskiĝis ĉe mi antaŭlonge, de tiam, kiam dum pasinta jaro (1922) s-o Sayers en junio-monato faris similan eksperimenton, parolante esp. per radiotelefono el Ameriko.

Pli frue ol okazigi ĉi tiun paroladon k-do Kazakeviĉ (komisararo de radio-telefona stacio, li estas esp-isto) sciigis per radiotelegrafo kaj radiotelefono eksterlandon kaj same R. S. F. S. R. pri okazigonta lekcio en rusa kaj esp. lingvoj, ke 25 aprilo precize je la 14.15 h. laŭ meza eŭropa tempo k-do Drezan faros la lekcion laŭtame: „Ĉu proletario bezonas internacian lingvon?“, petante al ĉi tiu dato nepre inviti en ĉiujn najajn radio-akceptejojn la reprezentantojn de loka gazetaro, administracio, „Gubono“ (Guberniaj Fakoj de Popola Klerigado), „Usono“ (Distrikta Fakoj de Popola Klerigado) kaj ankaŭ reprezentantojn de lokaj esp-istaj organizacioj.

Havante antaŭ si nevideblan, vastan aŭditorion, kiu etendiĝis en la cirklo, havanta proksimuman duondiametron — Moskva—London, k-do Drezan je la 14.15 h. komencis sian raporton unuan fojon en Ruslando (ĝenerale en la mondo, ĉar aliaj eksperimentoj estis farataj nur por tre mallonga sfero, ne pli ol 400—800 kilometroj) utiligante la ondojn de etero por esp. parolado, sendinte ilin al ĉiuj civitanoj de vaste etendiĝanta S. S. S. R. (Unuiĝo de Sovetaj Socialistaj Respublikoj).

La unua hirundo, kiu anoncis al ni, troviĝantaj kun k-do Drezan ĉe radiotelefona mikrofono, pri sukcesoj de la raporto, estis sono de sonorilo de simpla fadena telefono, kiu sonoritis tuj post la finita esperanta raporto kaj sciigis nin, ke Regna Instituto de Muziko ne nur aŭdis ĉion diritan, sed eĉ aŭditan surskribis (fiksita) sur la cilindron de fonografo.

Post la unua hirundo, certe, kiel ĉiam okazas, jam alflugis tutaj aregoj; ĉi tio estis sennombraj telegramoj, kiujn komencis ricevi inĝeniero Pepkeviĉ, afable liverinta ĉiujn kopiojn de ili por C. K. de S. E. U.

Por karakterizi el kiu konsistis la aŭskultanta aŭditorio kaj pri la aŭdebleco de lekcio mem, mi, certe, ne povas citi, eĉ parton de ili, kvankam mi trege deziras prezenti ilin en mallonga skizo, ĉar por ĉi tiu afero oni bezonas tro multan lokon. Tial mi limigas min je kelkaj telegramoj (aŭ pli precize dirite — eliraĵoj el ili), komence prenite la plej proksiman urbon de Moskva — Rjazanj'on (distanco de Moskva ĉirkaŭ 200 kilometroj) kaj poste iom post iom malproksimiĝante de la centro al periferio. Jen estas la tradukoj de telegramoj:

1. El Rjazanj'o. „La raporto de k-do Drezan aŭskultis du reprezentantoj de loka ĵurnalaro. Ĝi estis stenografite skribita de alsenditaj „Gubkom“ stenografiistoj. Aŭdebleco estas tre bona. La ekzempleroj de la gazetoj estas elsendotaj.“

2. Ostaŝkov. „La raporto estas aŭdita bone. Ĉeestis anstataŭanto de redaktoro, administranto de „Uono“. Entute la impresoj estas bonega. Dankon.“

3. El Kotelnjĉ. „La parolado per radio-telefono de k-do Drezan estas notita, kiel unu el la plej bonege aŭdataj; ĉeestantoj reprezentanto de „Ukom“ (Distrikta Komitato de Komunista Partio), reprezentanto de Fakoj de Popola Klerigado, prez. de regiona komitato Laborantoj de Ligilo (Poŝto, Telegrafo, Telefono kaj Radio) estis ravitaj per klareco de parolado.“

4. El Elatjma. „La raporto de k-do Drezan aŭskultis: la sekretario de „Ukom“ k-do Marĉuk, redaktoro de la loka gazeto „Ruĝa Sunleviĝo“ k-do Noskovenski, zorganto pri fakteponejo de pakajoj, administranto de Popola Klerigado Meljuskij, administranto de poŝtoŝeĉo Zaharov. La impresoj de aŭskultantoj pri la raporto: La raporto estas aŭskultita kun plena klareco de vortoj normala parolado. Similaj raportoj estas trege dezirindaj.“

El Harjkov'o. 25 aprilo oni aŭskultis radio-telefonan paroladon de prez. de C. K. de S. E. U. de k-do Drezan laŭtame: „Ĉu proletario bezonas internacian lingvon?“ La parolado de k-do Drezan estis aŭdita bonege, malaperis nek unu vorto. Ankaŭ estis bone aŭdita esp. parolado, sed ĉi tiun paroladon ni komprenis nur parte, ĉar ni ne scias esp. lingvon . . .

Similajn telegramojn oni ricevis el Rostov-Don, Ŝuja, Aletyr, Novgorod, Ardatov, Kaluga, Sterlitamak, Bogorodsk, Mamadys, Kursk, N-Nov-

gorod, Brjansk, Ustjug, Caricin, Gomelj, Pskov, Tula, Ĉerepovec, Baku (Kaikazo), Kaŝin, Bahmut, Kozlov, Ivanovo-Voznesensk, Krasnokokŝajsk, Vladikaŭkazo — entute 300 punktoj dissemitaj en S. S. S. R. kaj — nek unu telegramon el „eksterlando“, kio estas tre karakteriza.

Pri tio, ke eksterlando nin bonege aŭdas per radio-telefono, ni estas bone informitaj.

Dank' al potenco de nia radio-stacio oni povas certigi, ke unua esp. radio-ondo kompreneble estis aŭdata en tuta Eŭropo. Multnombraj provincaj gazetoj presis la notojn, kronikaĵojn kaj grandajn artikolojn pri ĉi tiu grava kaj historia lekcio.

Oni devas noti, ke dank' al tiu ĉi lekcio C. K. de S. E. U. starigis ligilon kun kelkaj malproksimaj organizaciaj, perdiĝintaj kun esp. mondo, ekzemple kun organizacio de Vladikaŭkazo kaj Urjum (de Vjatska gubernio).

La sukcesoj de raporto estas granda; ĝiajn rezultatojn ni jam havas kaj ili estonte devas ankoraŭ pligrandiĝi.

Organizinto la nunan esp. radio-lekcion en Ruslando. V. J.

II.

La 25 sept. 1923 mi ree organizis duan esp. radio-telefonan raporton, kiun afable konsentis fari nia prez. de Sovetlanda Esperanta Unuiĝo k-do Drezan, preninte aktualan temon „Tutsovetruslanda Agrikultura Ekspozicio“.

Nun, kiam mi kolektis ĉiujn materialojn pri la raporto, mi povas rakonti al gelegataro de ET pri tiuj sukcesoj, kiujn ni jam havas.

— Kiel antaŭe, mi prenos por mia hodiaŭa raporto pri radio-telefona esp. parolado tiujn sennombrajn telegramojn kaj sciigojn, afable disponeblajn por mi de estro de Moskva Radio Centro, certe, preninte el ili nur karakterajn eliraĵojn, ĉar la materialo en miaj manoj estas tro ampleksa kaj ĝin tute eluzi, kiel konvenus, mi ne povas.

Ĉar nun nia Unuiĝo de S. E. U. posedas multnombrajn reprezentantojn ĉe la lokoj, dum la raporto en radio-stacioj de: Odessa, Urjum, Ekaterinoslav, Nolsink, Caricin, Tula, Orenburg, Ligov, Ustj-Sysolsk, Ĉernigov, Vjatka, Bobrujsk, Orel, Vjazjma, Dorogobuj, Poĉepsk k. m. a. ĉeestis la anoj de nia Unuiĝo, kiu permesis fari la eksperimenton laŭ pli granda mezuro, ol antaŭe.

Jen tio kion la telegramoj raportas al ni:

1. El Odessa. „Ĉeestis esp-istoj kaj reprezentantoj el diversaj regnaj institucioj de urbo Odessa. Aŭdebleco estis bonega.“

2. El Urjum. „La esp. raporton de k-do Drezan aŭskultis reprezentantoj de „Ukom“ kaj esp. organizacioj. Aŭdebleco estas klara kaj bonega.“

3. El Nolsink. „La lekcio de Esp. estis aŭskultata de Scienca Ekkurso kun grandega ravo. Radiisto Strelkov faros pri ĝi raporton en esp. lingvo per poŝto.“

4. El Orenburg. „La raporton per radio-telefono aŭskultis esp. prof. Bezin kaj Rajtigito de C. K. de S. E. U. k-do Koblov. La impresoj estas belega. Aŭdebleco estas forta-klara. La recenzo en gazeto estas elsendota poŝte. K-do dankas pro organizado de la raporto.“

5. El Ljgov. „Ĉeestis speciale sendita administranto de ĝenerala fakoj de „Ukom“ k-do Vasiljev. Aŭdebleco estis bona. K-do Vasiljev estis mirigita, ĉar la impresoj estis fia, kvazaŭ oni parolas en urbo Ljgov (kie troviĝas radio-akceptejo) per simpla faden-telefono, nur sen malhelpo de faden-indukcio. La parolado de k-do Drezan estis tradukita de k-do Vasiljev preskaŭ plene en rusan lingvon por ĝin presi en loka gazetaro“ ktp.

Ĉe multaj lokoj estis muntitaj laŭparoliloj, apud kiu ĉeestis multe da publiko:

6. El Harjkov. „Aŭdebleco estis klarega. Oni aŭskultis per funelo je distanco de 5—10 paŝoj.“

7. El Brjansk. „Oni aŭskultis sen kap-telefonoj per la funelo. La parolado estis klara kaj komprenebla.“

Dum nuna fojo eĉ ne silentis eksterlando.

8. El Litovio. „Kaŭnas, 27 sept. 1923. Antaŭhierau je la 2-a h. mi havis la plezuron dum unu horo aŭskulti per radio-telefono la paroladon de s-o Drezan pri kio mi jam presis artikolojn en lokaj ĵurnaloj. P. Medem, del. de UEA, Kaŭnas, Smeling 12.“

9. El Belgujo. Al Popola Komisarajejo de Poŝto kaj Telegrafo, Moskva, Rusio. Urbo Bruxelles, 12 rue de l'Est.

„Rilate al la parolado radio-telefona de s-o Drezan pri la Tutsovetlanda Agrikultura Ekspozicio en Moskva la 25 sept. nunjare 14.15 h., mi havas la honoron informi vin, ke mi tre bone aŭdis kun mia privata radio-aparato la interesan paroladon de s-o Drezan, telefonitan per sendadon“ . . .

El privataj sciigoj oni ankaŭ scias, ke la parolado estis aŭdita ankaŭ en Berlin.

Suprecitata materialo pravas, ke mia dua esp. radio-parolado evidentiĝis, ke Sovetlanda Esp. Unuiĝo estas nun tiel bone organizita, ke ĝi povis sendi al la plej gravaj eksperiment-punktoj siajn reprezentantojn, kiuj ne nur sukcesis precize kapti je distanco de kelkmiloj da kilometroj de Moskva

vivan esp. paroladon, sed eĉ rekonis „laŭ tembro“ la voĉon de parolinto.

Do, komenco estas farita!

La breĉo estas farita!

Antaŭen k-do, sur la ondoj de radio!

Organizinto de la dua esp. radio-lekcio en Ruslando:
V. J.

Nia unua en la mondo Esperanto-Radio-Koncerto.

La 25 okt. 1923 mi sukcesis organizi Esp. Radio-Koncerton, kiun partoprenis: 1. seso da Moskva mandolinistoj-esperantistoj; 2. fortepiano kaj 3. gekantistoj Anisimov kaj M. S. Drezan.

La radio-koncerto estis bone aŭdata en tuta teritorio de S. S. S. R.

La 31 dec. 1923 je la 14.15 h. laŭ UEC okazis esp. radio-parolado de k-do E. Drezan pri „Nuntempa financa situacio de S. S. S. R.“

Victor Javorenkov, Moskva.

Informoj por radio-amatoroj.

Ĉi sube oni trovas informojn utilajn por personoj dezirantaj praktike konatiĝi kun la radiotekniko.

Radioklubo kaj Gazetoj.

Der Deutsche Radio-Club. Berlin SW Bellealliancestr. 30, eldonas la monatan gazeton: *Der Radio-Amateur, Zeitschrift für Freunde der drahtlosen Telephonie und Telegraphie.*

Radio-Club de France. 95, Rue de Monceau, Paris. Ĝia gazeto: *Radio-Revue.*

Radio Society of Gt. Britain. Eldonas la semajnan gazeton: *The Wireless World and Radio Review.* Eldonejo: *The Wireless Press, 12/13 Henrietta Str. Strand, London, WC 2.*

Radio-Club d' Italia, Roma, eldonas la gazeton „L' Audion“.

Radio-Club Suisse. Gazeto: „Radio-Suisse“. Eldonistoj: Rosselet & Stetter, St. Imier.

Libroj.

Der praktische Radio-Amateur. Das ABC des Radiosports zum praktischen Gebrauch für Jedermann. Von Hanns Günther (W. de Haas) und Dr. Franz Fuchs. Mit vielen Bildern im Text und einem farbigen Umschlagbild von W. Planck. 1923. Stuttgart. Franck'sche Verlagshandlung. 292 paĝoj. Preso 5,5 ormarkoj.

Der Radio-Amateur „Broadcasting“ Ein Lehr- und Hilfsbuch für die Radio-Amateure aller Länder. Von D-o Eugen Nesper. Mit 577 Abbildungen und 2 Kunstdruckblättern von L. Lutz Ehrenberger (XX, 368 Textseiten und 40 Anzeigenseiten). Verlag von Julius Springer. Berlin. Bindita 11 ormarkoj. Por eksterlando 5 dolaroj.

Ernesto Monti: Come funziona e come si costruisce una stazione per la ricezione Radio telegrafica-telefonica. Teoria. Pratica. Dati costruttivi. Editore Ulrico Hoepli, Milano.

La F. S. F. des amateurs. Télégraphie. Téléphonie. Manuel pour la construction et utilisation des appareils récepteurs de télégraphie sans fil par ondes amorties et par ondes entretenues et des appareils de téléphonie sans fil. 1923. 5 édition, revue et mise à jour, par F. Duroquier. 1 vol. in. 12 br. (356 pag. 352 fig.) Prezo 10 fl. fr.

Wireless Telegraphy and Telephony and how to make the apparatus. By E. Redpath. With 87 illustrations. Published by the House of Cassel, La Belle Sauvage, London, E. C. 4. Prezo 1 ŝilingo 6 penco.

How to Make Wireless Receiving Apparatus. 100 paĝoj, 90 ilustraĵoj. Published by Experimenter Publishing Co. 539 Park Place, Newyork. Prezo 35 cendoj.

How to Make Wireless Sending Apparatus. 100 paĝoj, 88 ilustraĵoj. Published by Experimenter Publishing Co. Newyork. Prezo 35 cendoj.

Loud-Falkers. How to build them. By H. Winfield Secor. 64 paĝoj, 25 ilustraĵoj. Prezo 25 cendoj. Published by The E. J. Company. Newyork City.

Krom la supre nomitaj gazetoj ni citu ankoraŭ: „*Radio News*“. The largest radio magazine in the world. Ĉiumonata. Numero enhavas pli ol 200 paĝojn. Eldono de: Experimenter Publishing Co., 53 Park Place, Newyork, N. J. Prezo de la numero 25 cendoj.

„*Modern Wireless*“. Ĉiumonata. Published by Radio Press. London. Devereux Court, Strand, W. C. 2. Prezo de ĉiu numero 1 ŝilingo.

„*Amateur Wireless and Electrics*“. Edited by Bernard E. Jones. The Leading 5 d. weekly. Published by Cassels. La Belle Sauvage. London E. C. 4. Prezo de la numero 3 penco.

„*Radio für Alle*“ (Radiokosmos). Frankh'sche Verlagshandlung. Stuttgart. Prezo de la numero 0,40 ormarkoj.

„*Radio Wereld*“ Weekblad voor Nederlandsche Radio-Amateurs. Eldonejo: Engers & Faber

N. Z. Voorburgwal 250, Amsterdam, holanda gazeto por Radio-amatoroj.

Literaturo: Leiddraad por het Zelfsvoorwaardigen van draadloze Toestellen v. Harris-Polak, hfl. 1,75 — Draadloze Telegraaf en Telefonie voor iedereen hfl. 0,75. Eldonejo: Techn. Boekhandel Nederl. Persbureau Radio Keijzersgracht 562, Amsterdam.

Kunmetis A. Hajkis, Berlin-Charlottenburg.

Radio-paroladistoj

Aranĝantoj de radio-paroladoj neniam forgesu indiki en siaj avizoj la ondo-longecon de la koncerna stacio.

Tekniko.

Radiotekniko.

Senfadena lumigado?

Depost la eltrovo de la senfadena transigo de l' sono (radiotelefonio) nun streĉas la scienculojn la problemoj de la senfadena transigo de la lumo. Post multaj sensukcesaj eksperimentoj sukcesis nun la muntisto Havlitcek en Oberleutersdorf (Ĉeĥoslovakio) ĉe flu-tensio de 20 voltaj kaj 1,5 amperoj, transigi lumon senfadene.

Ĉar la senfadena lumigado en malgranda skalo montris tiajn bonajn sukcesojn, la urba konsilantaro de Oberleutersdorf disponigis al la eltrovinto la monrimedojn, por ke li povu plie eksperimenti. Ĝi ankaŭ igis starigi maston por ekzameni la eltrovon per la flua elektroproduktejo.

Kvankam la eltrovo estas tenata sekrete, estas jam sufiĉe konata, ke la „senfadena lumigado“ bonege funkcias, kaj oni supozas, kiam la eltrovo estos industriigita, ĝi kaŭzos revolucion en la sistemo de elektra lumigado.

—pp—

Internacia trafiko.

Ponto super la Skeldo (Belgujo).

La belga registaro intencas jam longatempe konstrui ponton super la Skeldo al Hemixem je kelke da kilometroj sude de Antwerpen. La Skeldoriverego tie ankoraŭ havas larĝecon de 500 metroj. La nova ponto servus precipe kiel fervojoŝanĝo kaj estus destinata por la rekta veturado inter Ostende kaj Germanujo, tiam oni ne plu bezonus veturi tra Bruxelles; la vojo do estus pli mallonga.

Por la interligado de la ambaŭ Skeldobordoj — por la estonteco de Antwerpen kiel havena kaj komerca urbo tiel grava demando — tiu ponto do certe ne signifas multe; sed por la bordinterligado nur, la registaro intencas konstrui en la urbo tunelon sub la riverego.

R. v. Eynde, Antwerpen.

Poŝto.

Venontan someron en Stockholm okazos nova kongreso de la Universala Poŝta Unio, kiu verŝajne daŭros 6 semajnojn. Ĉirkaŭ 1000 proponoj estos pridiskutataj. Samtempe kun la kongreso estos festata jubileo okaze de l' 50-jara datreveno de la fondiĝo (fond. 9. 8. 1874). Oni eldonis ankaŭ specialajn poŝtmarkojn.

(Laŭ sveda gazet-telegramo.)

Aerveturado.

En aeroplano al Norda Poluso.

La konata arkta esploristo Amundsen, vizitinta Berlin'on en la komenco de januaro, komunikis al la reprezentantoj de l' gazetaro ke venontan majon aŭ junion li faros rean provon flugatingi la nordan poluson. Amundsen flugos el Spitzbergen kaj esperas atingi la poluson en 24—26 horoj. La du aeroplanoj uzotaj por la flugo estos provizitaj per subboatoj, ebligontaj al la flugontoj eventualan surmarigon.

Scienco.

Medicino.

Interŝanĝo de okuloj.

En la pasinta jaro sinjoro Koppányi T. Hungario anoncadis, ke li sukcesis interŝanĝi okulojn ĉe ratoj kaj ke tiuj okuloj efektive „vidis“. Ni ne devas speciale akcenti, kiam gravecon tia eksperimento havus, se ĝi estus ekzakta. La scienco mondo akceptis la famon kun justa dubemo kaj tial la oftalmologia societo en Vien ekzamenis la eksperimentojn de suprenomita juna scienculo. Ĉe la eksperimentado sinjoro Koppányi ankaŭ ĉeestis. Laŭ la raporto de la komisiono oni interŝanĝis 211 okulojn kun plene negativa rezultato. 117 okuloj konservis sian formon sed nek unu „vidis“. Do la problemoj provizore estas ne solvita.

M.

Nova kuracilo kontraŭ sifiliso.

Laŭ sciigoj de Paris'aj gazetoj en la Pasteur-instituto estas eltrovita nova kuracilo kontraŭ sifiliso, samtempe efikanta ankaŭ profilaksie.

Aktuala politiko.

La telegraf-oficejoj komunikas, ke unu el la plej famaj gvidantoj de la komunismo kaj de Soveta Ruslando Vladimiro Iljiĉ Lenin (Liljanov) mortis la 21. januaro en la Kremlo en Moskva, havante aĝon de 54 jaroj.

Internacia sporto.

Skikurado.

De Arhangelsk al Moskva per skioj.

La sportistojn, precipe la nordlandajn, la skistojn sendube interesas la pli ol 1000 kilometra marŝo, entreprenita en Rusujo por eksperimenti la taŭgecon de l' militista ekipo por longdistanca skiado.

La volontulaj partoprenantoj de la unika skimarŝo estas bone konataj inter moskvaj skistoj militkursanoj Barhaŝ, Grebenŝĉikov, Ĥitrov kaj Skalkin. Elveturinte la 21. XII el Moskva kaj veninte al Arhangelsk, ili jam la 24-an elmarŝis de tie, skiante en plena militkampa ekipo kun pafilo, tornisiro, pansako ktp. La antaŭe difinita vojplano estis: Arhangelsk—Kargopol—Cerepoveĉ—Vologda—Jaroslavl—Moskva. La ĉ. 1200—1300 versta vojo tra nordaj regionoj al altajaro kaj ebenajoj de l' meza Ruslando prezentas ne malgrandajn malfacilaĵojn por tiaspecaj vojaĝoj. Severa norda naturo, fortaj frostoj, granda senhoma marĉlando kaj vastegaj preskaŭ netraireblaj arbaroj de l' nordaj gubernioj, ĝenerale tre malmulte loĝataj, kie ne nur urboj, sed eĉ vilaĝoj estas lokitaj unu de la alia kelkaj dekoj da verstoj, ĉio ĉi estis superoj de la areto survoje.

Kaj vere, jam la unuaj sciigoj de l' moskvaj gazetoj raportas pri egaj malfacilaĵoj kaj malhelpoj, superitaj de l' bravaj skistoj. Multaj naturaj baroj estis ĉirkaŭitaj, dume la malalta temperaturo malfavoris glitadon de l' skioj. Cent-versta distanco estis irata ekskluzive laŭ kom-paso kaj foje ĉe — 25° R. estis vadata rivero. Entute dum 6 unuaj tagoj estas trairitaj 385 verstoj. Jam nun evidentiĝis absoluta neataŭgeco de apartaj ekipaĵoj por longtempa skiado.

Laŭ moskva „Izvestija“ R. Lorentson.

Diversaĵoj.

La ŝtatuoj por fervojo.

Oni telegrafas el Leafield ke la persa registaro decidis monigi parton de l' kortegaj juveloj kaj aliajn valorojn por gajni la por la konstruado de fervojoj necesajn rimedojn.

Morto de Eiffel.

Laŭ sciigoj el Paris la tekniko perdis unu el siaj famaj reprezentantoj. La 28. XII mortis tie inĝeniero Eiffel, la konstruinto de l' konata Eiffel-turego.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtarko aŭ aparta fojlole unufanke skribita, sed ne inter administrat' aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉo: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

Aŭstrio.

Linza. D. La movado progresas tre malrapide. Nur la laboristoj okazigas kelkajn kursojn; sed ĉi tiu partia uzo de nia lingvo nur parte helpas. Eŝepte la polico, kiu posedas ankaŭ kursojn esp., la tuta vivo (ekz. komercistoj, studentaro, gazetaro ktp.) estas kontraŭesp-ista. Necesegaj estus paroladoj, nature senpolitikaj; dezirinda Esp-ekspozicio; certe ĉiuj esp-istoj de Linz volonte helpus.

Bulgarujo.

Vidin. Dank' el la laŭdindaj penadoj de la samideanoj V. Lazarov kaj P. Colov Esperanto grandpaŝe progresas. Estas malfacilaĵoj da kursoj por geurbanoj gvidataj de ili. Partoprenas 70 gekursanoj. La flua esperantista societo „Espero“ bone kaj sukcese agas. Per alvokoj, grandformaj afiŝoj ktp. ĝi varbis al Esperanto multe da amikoj. Georg.

Francujo.

Toulouse. Dimanĉon, 18. dec., la s-anoj de Toulouse, al kiuj aliĝis S. Roy, de Gaillac, kunvenis je la tagmezo en la Hotel du Bon Pasteur por glori festene la naskotagon de la Majstro. Ĉeestis s-o Beaumel, la nelacigebla esp. instruisto, kun siaj multaj gelernantoj; s-o Dubois, profesoro, pioniro de Esp. en Toulouse, kapitano Caujolle, ano tre fervora, ne povis ĉeesti. Goje oni mangis, babiladis, diris, diris monologojn, kantis akompanatajn per la violino de f-lino Aŭstruj famajn kantojn ktp.

Germanujo.

Bonn. La 15. jan. okazis granda kristnaska festo de la surdmultulo de Bonn. Alernis teatroprezentadoj, kantoj kaj paroladoj. Membro de la grupo de surdmultaj esp-istoj deklamis (laŭ la ebleco de lia parolovojo) la himnon kaj diversajn esp. poeziaĵojn. S-o pastro D-ro Rung propagande parolis pri Esp. akcentante, ke estis la unua fojo, ke surdmula esp-isto publike parolis. Per la gestia lingvo li klarigis al la neces-istaj surdmultuloj la grandan valoron de la internacia helpilo. Dank al la valora helpo de s-ino Week la festo estis tre impresiga kaj agrabla por ĉiuj ĉe-estantoj, kiuj ricevis en loĵimo valorajn donacojn.

M. Butin.

Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth.

En la januara ĉekunveno (14. I.) oni unuanime reelektis la ĝisnunan estraron, aldonante ankoraŭ kelkajn fakesitojn. Do la estraro nun konsistas el jenaj gesinjoroj: prez. s-o Otto Pilhofer (samtempe por propagando); vizprez. s-o ĉefinstruisto Lor. Meyer (samtempe: instruoj kaj plezuraj); kas. s-o Max Hönigsberger (samtempe

organizado); I. sekr. f-lino Anni Hirsch; II. sekr. s-o Josef Isner; por la gazetaro: s-o studkonsilanto Walter Hausen.

Jugoslaviao.

Bjelovar. En nia malgranda urbeto estas ankaŭ fondiata esp. klubo. La estraro konsistas el jenaj s-oj: prez. D-o V. Peičić, kuracisto; vizprez. prof. R. Schey, gimnazia instruisto; sekr. F. Poljan, poŝtoficejo; kasisto kaj bibliotekisto: D. Došek, razisto. Ni havas nun du esp. kursojn, unu por geurbanoj kaj la alian por gelaboristoj. La unua finiĝos jam post kelkaj tagoj. Al la laŭdinda klopodo de s-o Křepelka, gvidanto de unua kurso, ni devas danki, ke nia lingvo ricevis novajn gemikojn kaj geanojn. La laborista kurso gvidata de s-o Poljan tre bone progresas kaj promesas bonan sukceson.

Zemun. La 3. jan. fondiĝis en Zemun „Esperanta Klubo Mojsije Pačić.“ En la estraron estas elektitaj: prez. s-o Miloje Koča, polceastro, sekr. s-o Branko Raiĉić, kasistino f-lino Zora Raiĉić, kunloĝitaj komitatoj s-oj Fran Kolar kaj Vasa Milinković. Ĉiuj ĉeestintoj entuziasme konsentis pri elekto de malnova kaj agema s-ano D-o Paĵa Stanišić, del. de UEA, kiel honora prez. de la klubo, ĉar li estis la unua, kiu komencis la postmilitan perseperantan propagandon en nia urbo, kaj preskaŭ ĉiuj ĉeestintoj estis liaj lernantoj. Ĝis nun la klubo havas 16 membrojn, kaj kunvenas ĉiumarde je la 7. h. vespere en „Hotel Central“.

Eble ne estos seninterese ion preparoli la nomon de la klubo. Nur al malmultaj s-anoj fariĝos ĝi konata. Nome, Mojsije Pačić, lama zemuna urbano, eldonis en la jaro 1865 novan tre bonan pazilian kaj pazigrafian sistemon, kiu estis ĝis tiam la plej bona, kaj alportis al li la elekton de honora membreco ĉe multaj gravaj sciencaj institucioj. La nomo Mojsije Pačić do prava, ke la ideo pri la rimedo por internacia interkompreniĝo ne estas nova, kaj ni zemunaj esp-istoj prave rajtas esti fieraj je ĝi. Pri Mojsije Pačić estas iom citita ankaŭ en Zamenhofa Fundamenta Krestomatio en la artikolo „Al la historio de la provoj de lingvoj tundoj de Leibnitz ĝis la nuna tempo.“

Br. R.

Svedujo.

Sollefteå. La laborista gazeto „Nya Norrland“ aperigis vicon da artikoloj de s-ano Quint pri la kongreso de Nürnberg kaj pri liaj vojaĝoj post la XV-a tra mizera Germanujo. La raportoj kaŭzis grandan impreson.

XII-a Germana Esp.-Kongreso

en Plauen (Vogtlando), pentekosto 1924 (7. ĝis 10. de junio).

Kvina komuniko!

Fine, post multmonata malcerteco, ni nun laŭ la nova germana valuto povas omette prikalkuli la kongresajn elspezojn kaj decidi pri diversaj aferoj. Ĉiam denove ni celas plibeligi nian kongreson, sed la sukceso nun dependas de vi, kiuj ne ankoraŭ aliĝis. Ni bezonas vian anoncon por scii, kiom da kongresajoj ni proksimume bezonos; la kongresa kaso bezonos viajn kotizojn pro multaj elspezoj:

Aligo: Aliĝu tuj kaj sendu samtempe viajn kotizojn por faciligi niajn antaŭlaborojn! Kiu ne posedas aligiloformulon, anoncu sin letere al la adreso de la subskribinto!

Nova kotizo: Por la ĝis nun pagitaj kotizoj ni aĉetis necesajn ĉiam plej eble baldaŭ, sed malgraŭ tio ni ne povis malhelpi, ke parto de la mono senvalorigis. Por povi rekonstrui la aferojn, kiujn detruis unue la prokrasto de la kongreso kaj poste la valuta mizerio, ni devis fiksi depost la unua de januaro kotizon de 3 g. mk. laŭ la nova valuto. Edzinoj kaj infanoj pagas la duonon.

Donacoj: Ni kore petas viajn gesamideanojn, kiuj povas helpi al ni, ke ili bonvolu sendi donacojn por la kongresa kaso.

Postpago: Ni ne volas „puni“ la jam aliĝintojn pro ilia modela fervoro kaj tial ne postuli postpagon. Sed oni rekompencu nin per plej eble forta varbado por donacoj kaj aliĝoj, por ke ni ne havu la tutan laboron dum la lastaj monatoj antaŭ la kongreso.

Adreso por mongendoj: Aŭ la adreso de la subskribinto aŭ Vogtländische Bank, Plauen. La nomita banko havas

poŝtĉekan konton Leipzig Nr. 898.

Sendante monon, oni samtempe anoncu, ke ĝi estas uzota por la kongreso.

Listo de la aliĝintoj: Estas rekomendinde, ne publikigi ĝin por ŝpari lokon en ET.

Fakunsidojn deziratajn oni anoncu tuj, samtempe sciigante la adreson de la gvidanto.

Adreso por korespondadoj estas tiu de la subskribinto.

Hermann Scheider,

Plauen i. V., Morgenbergstr. 47.

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale esprataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen en prenis sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuala riziĝi neŭtraj artikoloj.

254. Teknika Terminaro.

Rilatas al 245.

La komunikado de sinjoro redaktoro Kreuz eksplodigos espereble vialan diskuton. La problemoj de la internacia terminaro estas ja tiom gravaj kaj tiom konformaj al la spirito de nia epoko ke ĝi nepre interesas grandan aron da profesuloj kaj amatoroj. Sub teknika terminaro — kaj mi tion volas akre akcenti — oni ne nur komprenu la pure teknikajn vortarojn; ĉiu scienco, ja ĉiu spirita movado posedas siajn specialajn devizojn, sian apartan teknikajn terminaron. Ĉu Esperanto devas bezoni ĉi tiu? Pri tio ne ekzistas dubo. Ĝis nun aperis kelkaj fakaj vortaroj, tre multe da artikoloj kaj ni devas konstati ke la preciza lingvo de Esperanto konstante evoluigas. La progresoj atingas sian maksimumon en la sfero de la pure konstruktiva tekniko (vidu la Maŝinoelementojn en Esperanto de Wüster ktp.), la rezultoj ne tiom anonciĝas sur pure sciencaj agadkampoj. Kiel negativan progreson mi devas registri la grandan silenton en la filozofiaj fakoj. Kial la samideanoj filozofoj ne ekagas evolugante siajn proprajn lingvaĵojn?

Ĝojinda estas en la lasta tempo la granda progreso koncernante la teknikan lingvon de Esperanto. Precipe ni vidas tion ĉe la oftaj artikoloj pri Radiotelegrafado. Dume ankaŭ kelkaj jaroj la esperantaj „gazetoj“ entenis ĉefe detantaĵojn, hodiaŭ ilia enhavo estas samvolva kiel tiu de bonaj nacilingvaj revuoj. Grava laboro estas la laboro de la terminologistoj, lertecan postulas la ĝusta utiligo de la ili atingitaj fruĵoj.

Gekolegoj, kiuj laboras aŭ volas labori por la granda celo... oni evoluigu la modernan teknikan sillon de Esperanto, laboru ĉiuj en viaj propraj fakoj kaj komuniki viajn artikolojn sur la paĝoj de niaj ĉefaj revuoj. Eble ET disponigos lokon de tempo al tempo al artikolo temanta pri jam konata afero, kiu tamen donos multe da inspiro rilate al terminaro. *)

Jozefo Major, kand. elektro ing. Budapeŝto, nun en Oldenburg.

*) Rimarko de la redakcio: De kelka tempo jam oni rimarkas pli malpli agadon en la div. rubrikaj de ET. Ni volonte disponigos al la loko por tio. Verbu novajn abonantojn. Tio ebligas al ni pli ampleksigon de nia gazeto kaj de la praktikaj artikoloj.

255. Pri „Fundamento de Esperanto“.
Rilatas al 221.

S-o Leo Dreher tute malprave certigas ke „Fundamento konsistas nur el la 16 reguloj“ kaj ke „Erzercaro“ ne estas ĝia parto. En „Deklaracio pri la esenco de la Esperantismo“, akceptita en la Unua Univ. Kongreso 1905 en Boulogne-sur-mer, ni legas: „la sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto“, en tiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon“. Kion do nome ni devas kompreni sub tiu ĉi titolo „la verketo Fundamento de Esperanto“ tion klarigas jena rimarko al „Projekto de Deklaracio“, kiu rimarko poste estis formetita el la oficiala teksto de la Deklaracio: la verketo „Fundamento de Esperanto“ enhavas: 1. la 16 regulojn de la gramatiko, 2. la „Ekzercaron“ de L. Zamenhof kaj 3. la „Universalan Vortaron“ de L. Zamenhof. *)

La samon ripetis la aŭtoro de la Deklaracio, Dr. L. Zamenhof, en sia Antaŭparolo al la aparta eldono de „la Fundamento de Esperanto“, farita komence en lingvoj franca, germana, angla, rusa kaj pola kaj poste en tiuj aliaj lingvoj. Li diris tie jenon: „la sekvantaj tri verketoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1. la 16-regula gramatiko, 2. la „Universala Vortaro“, 3. la „Ekzercaro“, ĉiuj ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel legojn“.

Estas tre stränge, ke s-o Leo Dreher, ĉi sperta esperantisto, ne scias tian simplan kaj gravegan por nia afero fakton. Tio estas klarigebla nur per tia supozo, ke li mem ne posedas en sia biblioteko la „Fundamento de Esperanto“, pri kiu d-ro Zamenhof diras en la sama „Antaŭparolo“ ke „ĝi devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto, kiel konstanta gvida dokumento... kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankigo de la vojo de unueco.“

Dume nun, kiam nia movado jam travivis la unuan pure propagandan periodon kaj eniris en la periodon de la tiumonda praktika uzado, nun ni devas precipe atenti rilate nian lingvan unuecon. Sekve nun estas necesege renovigi eldonadon de la „Fundamento de Esperanto“, por ke ĝi efektive troviĝu en manoj de ĉiu bona esperantisto.

A. P. Andrejev, Tiflis, Georgio.

*) Rigardu libron „Universala Kongreso en Boulogne-sur-mer 1905, Kongresaj projektoj“, p. 31.

256.

Malfermita letero!

Antaŭ nelonge mi trafolumis la „Oficialan radikaron“ de s-o E. Wüster. Sed kvankam ĝi nomiĝas „Oficiala radikaro“, sub kia nomo rajtas esti eldonataj nur la Fundamenta radikaro kune kun Oficialaj Aldonoj de la Akademio, tamen la tiel nomita „Oficiala“ radikaro de s-o E. Wüster estas *miksaĵo* de la vera Oficiala radikaro kun E. Wüster'a lingvaĵo. Do, la superskribo „Oficiala“ ne konfirmigas al la enhavo de la libro.

En la antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto D-o Zamenhof skribas:

„Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton *arbitre* fari en nia Fundamento unu eĉ plej malgrandan ŝanĝon! Tiu ĉi tre gravan principon la esp-isto volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektaŭso de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektaŭsu tiun principon, estus la komenco de nia morto.“

Ĉiu esp-isto povas havi tiun ĉi aŭ alian koncepton kaj opinion pri la Fundamento; li povas esti partiano de novaj vortoj kaj gramatikaj formoj; en siaj artikoloj kaj verketoj li rajtas uzi la proponitajn novajn vortojn kaj gramatikajn formojn, sed disvastigi siajn privatajn ne-oficialigitajn prilingvajn eksperimentojn kaj reformojn sub la nomo „Oficiala“ li ne rajtas.

Mi plej energie protestas kontraŭ la malinda agmaniero de s-o E. Wüster kaj invitas la koncernajn Oficialajn Esperanto Institutojn fari la samon.

Reproso petata.

Adolf Vimson, Tallinn, Estonio.

P.S. Mi ĵus eksciis el „Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio“, ke la 22. IX. 23 en la ejo de „Esperanto“ s-o K. Sakaria referis pri la lingvaĵo de E. Wüster kaj ankaŭ kondamnis la agmanieron de s-o E. Wüster.

Katolikoj!

„Aŭstra Katolika Ligo“ informas, ke kontraŭe al la informo en ET 172 de 30. 12. la katolikaj di-servoj en Vien okazas ne ĉiun 3-an, sed ĉiun duan dimanĉon.

Radioparolado en Southbourne.

Rilatanie al la noto en ET 175 la grupo de Southbourne informas, ke la radioprezentado esperanta okazos la 31 januaro je la 20.50 horo laŭ Greenwiche.

Unuigo de Germanaj Instruistoj.

Nun post la stabiligo de la germana marko la kotizoj ne plu estu pagataj po kvaronjaro, sed po jaro. La jar-kotizo nun estas 1,5 or mk.

La kotizon oni sendu al nia kasisto, kolego Franz Thiel, Dresden A 29, Weidentstr. 20. (Poŝtekonton Dresden 735, Stadtgroskasse Dresden 4651.)

A. Sohrmann, Weinböhla.

Subtenu la oficialajn instituciojn!

Kiu rapide donas, tiu donas duoble.

Mia amiko, internacia legolibro kun verkoj de Zamenhof, Bourlet, Selma Lagerlöf, Sigemacu, Ramstedt, Rabindranat Tagore, K. Bein, Gogol, Abdul Baha ktp.

Guto post guto, kolekto de plej belaj originalaj versaĵoj de esp. poezio; verkoj de Zamenhof, Hankel, Franz, Simeonov, Privat, Soloviev, Schulhof, Doleys, Nekrasov, Kaus, Silvestriev, Georg Deŝkin, Kühne ktp.

Ĥinago, rakonto de Jack London, kun aŭtoro permeso trad. el angla lingvo P. Kalisky-Kay.

Blanka cigno, poemo de K. Balmont, trad. el rusa lingvo de N. Nekrasov.

Dek diversaj esp. ilustritaj poŝtkartoj.

Sen-**P. Hitrov**, Berlin-Charlottenburg 2, Fach 18 das

Ĉiuj por nur **2** svlsaj frankoj aŭ egalvaloro

Malaltigo de prezoj.

Por akceli la disvastigon de niaj bonstilaĵaj libroj ni fiksas ĝis-plue prefer-prezojn.

<i>Bukedo</i> , 1. volumo	0.60 sv. fr. aŭ
<i>Malriĉa en spirito</i>	0.50 ormarkoj
<i>Bjalystok</i>	0.50 sv. fr. aŭ
<i>Albanio</i>	0.25 ormarkaj

inkluzive sendkostoj.

Utiligu la favoran okazon! — Mendu tuj ĉe

Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“
Horrem b. Köln (Germanujo).

Jus estas presata
Eŭropo ĉe la abismo

de
Francesco Nitti
iam ministro de prezidanto itala

Esperanto-traduko

kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.



Petu prospektojn kaj detalojn kaj sendu antaŭmendojn je favorprezo al

Frankf. Societäts-Druckerei G. m. b. H., Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M.

Korespondon en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzotaj.

Prezo-redukto!

Favorprezoj por libroj.

Taglibro de vilaĝpedelo Malriĉa en spirito.

Ĉiu libro kostas provizore nur 0.60 sv. fr. aŭ 0.50 or-mk. inkluzive sendkostoj. Skribu tuj al

Butin & Jung, G. m. b. H.
Godesberg (Germ.) Bahnhofstr. 30.

Meyer's Handlexikon

oka eldono, komplete re- prilaborita kaj plimultigita

75.000 gvid-vortoj kaj referencoj kun 2.000 ilustraĵoj sur 1.632 pĝ. da teksto, 7 kolor- itaj, 46 nigraj tabeloj kaj tabel-listoj, 8 koloritaj kaj 37 nigraj landkartoj, 24 re- :—:—: sumaj tekstoj kaj statistikoj :—:—:.

unu volumo

tole bindita mk. 13.— × ŝlosiln.

eksterl. sv. fr. 13.—

duontole bind. mk. 18.— × ŝlosiln.

Eldonejo de
Bibliographisches Institut
Leipzig.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okaz- ontaj gravaj esp. kunvenoj festoj k. s.) sen p. p. Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekve elpresoj, kostas po du presoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭ pago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depre- ni la pagon de la abonkoto, ĝuas por propra anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.— mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

Atentu! Adreso-ŝanĝo. S-o Frans Schoofs, agente de ET en Antwerpen, Kl. Beerst. 45 nun loĝas: Kleine Hond- straat 11. [1]

TUTMONDAJ ANARKIISTOJ! Ni organizu fakan kunvenon dum la kongreso de Wien. Skribu al: Dimitri Zlatarski, Trakijska 24, Varna, Bulgarujo. [1]

„La kvinjaro de Sovetlando“—luka albomlibro pri Kvin- jara ekzistado de la Sovetaj Respublikoj. 80-paĝa, 70 ilustraĵoj. Trad. V. Polakov, Aĉetebla ĉe Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (Moskva-Rusujo, PK. No. 630). Prezo por malbonval. 1 sv. frk., mezval. 1 sv. frk., bonval. 3 sv. frk. Por afanko oni aldonu 100%. La libro estas sendata post antaŭpago per monbiletoj stabilvalutaj en rekomenditaj leteroj. [2]

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

S-oj Laz. Abramoviĉ, ul. Aktiabriĥskoj Revoluĉij 1, Ta- ganroj (antatie en Boku, Azerbajĝano) informas siajn korespondantojn pri nova adreso. Pro daŭra vojaĝado multaj korespondantoj povos nur esti respondataj post kelka tempo. Li petas daŭrigi la korespondadon. [2]

Papermonojn por kolekto mi deziras Germanujo, Rusujo, Ukrainio, Polujo, Aŭstrio kaj Hungarujo kontraŭ pago. Adreso: „Trans-Oriento“, strada C. A. Rosetti 3, Bucu- resti, Rumanujo. [2]

Filatelistoj en London! atentu! Mi donos multe da serioj de polaj aŭstriaj kaj sovetaj pm. al tiu, kiu elsciigos kaj skribos al mi adreson de mia bofrato en London. Lia nomo Mendel Bloch, cirkaŭ 45 j., li estas en Anglujo jam 15—18 jaroj, li alveturis el Rusujo. — Leon Ringler, „Premier“, Polska-Boryslaw, Polujo. [2]

S-o Michelo Forstner, Landshut (Bav), Germanujo, Bahn- hofstr. 23, serĉas gkorespondantojn el ĉiuj landoj. Li preferas temojn pri natur-scienco, filozofio kaj parencaj fakoj. Li ĉiam respondas. [2]

Mi deziras vendi aŭ interŝangi multajn librojn, ĵurnalojn, revuojn kiujn mi havas duoble en mia biblioteko. Inter ili: plena kolekto de la Revuo, Zamenhofaj verkoj aŭ tradukoj ktp. Listo kaj prezoj kontraŭ respondkupono. E. Deligny, 20. LIEA, 4, rue Alleni, St. Omer, (P. de C. Francujo) [2]

Juna fraŭlino, 20 jara deziras interŝangi kun la tuamondo pli bonajn Pm. kaj panoramkartojn. Minna Hoder, Trautemau, Reichsstr. 67, Ĉehoslovakio. [2]

S-o Germ. Michiels, instruisto-studento, Staatsonormaalschool, Gent (Belgiujo) deziras korespondadi kun la tuta mondo per Pm., Pk. kaj Lm. [2]

S-o Arthur Versmissser, instruisto-studento, Ledeganckstr. 8, Gent, Belgiujo, deziras korespondadi kun la tuta mondo per Pm., Pk. kaj Lm. [2]

Naŭ junaj Esperantistinoj (15—16 jara) deziras interŝangi il. Pk. kun eksterlandaj gesamideanoj, Adresu al F-lino Bl. Geers, Sint Jobststrasi 65, Antwerpen, Belgiujo. [2]

S-o A. Hamelink, Rembrandtstraa 71, Hago, Nederlando deziras korespondi per L. kaj interŝangi Pm., precipe Rusujo, Svedujo, Bulgarujo, ankaŭ il. Pk. [2]

Filatelistoj! Kiu sendas al mi de 50—250 pm. ricevas saman kvanton de Polujo, Litovio, Rusujo kaj Silezio. Adreso: Daniel Sztajman, Radom, Lubelska 30, Polujo. Respondo certa! [2]

Du fraŭloj, Jozefo Hegert kaj Emeriko Medvezcky, Colmar, rue Rapp 13, Francujo, deziras korespondadi per il. Pk. k. ĉ. l. gesamideanoj. [2]

Fraŭlo 19 jara deziras korespondadi per L. Pk., kolektadi papermonon Pm. librojn sciencajn ktp. S-o Miguel Dal- mau, str. Brasil 24, Sans (Barcelona), Hispanujo. [2]

Esperantisto serĉas korespondadon kun ĉiuj landoj, pre- fere kongresotaj vizitantoj de Wien. Werner Rentmeister, Wien 3, Kölblgasse 10. [2]

S-o Hermann Platel, librotenisto, Landshut (Bav.) Ger- manujo, Alstadt 590. 2. deziras korespondadi pri ĉiuj temoj, precipe natur-filozofio kaj naturscienco. Labor- istoj estas preferataj. Li ĉiam respondos. [2]

S-o Debarbieri Guglielmo, via Casaregisi 55, Genova, Ital., deziras interŝangi pm. kaj pk. kun gesamideanoj de la tuta mondo. Mi preferas Svislandon, Nederlando, Bul- garujon, Grand-Britujon, Danujon, Norvegiujon, Svedujon kaj Afrikon. [1]

Korespondemuloj! Germana junulo deziras interrilatiĝi kun ĝeunuloj de eksterlando, precipe kun inoj. August Spürkel, Horrem b. Köln, Hindenburgstr. 22, Germ. [2]

S-o Erich Hums, oficisto, Körnerstr. 11, Oelsnitz, Vogt-, Germ., deziras interŝangi pm. kun la tuta mondo. Mi donas bonajn pm. Respondas tuj. [3]

S-o Johano Kratochvilla, instruisto, Sered, Bratislavska ĵupa, Ĉeosl., deziras interŝangi pm. kun Svedujo, Nor- vegujo, Irlando, Portugalujo, Soveta Rusujo, Bulgarujo, Jugoslavio, Saarteritorio, Danzig, Memel, Supera Silezio, kun ĉiuj ekster-eŭropaj landoj. Ĉiam respondos. [1]

New Orleans! Mi deziras korespondi kun esp-istoj en New Orleans. Adreso: S-o J. B. E. de Koster, 98, Dalton- straat, den Haag, Nederlando. [1]

Frato kaj fratino deziras korespondi kun la tuta mondo per il. pk., l. kaj interŝanĝas pm. F-lino Theresia Schwartz kaj l-o ing. Otto Schwartz, Aussig (Elbe), Teplitzerstr. 26, Ĉeosl. Ĉiam respondos. [1]

S-o C. N. Lou, sekretario de hina vicambasadorejo en Roma, deziras interŝangi pm. kun ĉiuj landoj. Adreso: Via Nomentana 118. [1]

S-o Semmi Hautamäki, Vaasa, Rautakatu 26, Finlando, deziras korespondi per l. kaj il. pk. kun ĉiuj landoj. [1]

Esp.-glerantoj de Rauma, deziras korespondi per il. pk. kun la tuta mondo. Skribu unue al F-lino Elli Väinänen, Työvänösuusliike, Rauma, Finlando. [1]

Filatelistoj! Por 2 svls. frk. aŭ egala valoro mi sendas 30 div. maloftajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Inter- ŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölpnitz i. Vogt., Bergstr. 3. [2]

Varbu!